

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten
im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo 1972



Freizeit und Hobby



Esperanto zur Verständigung und Freundschaft

Hobio - aŭ pli?

(originale en Esperanto)

Libertempo antaŭ 40 jaroj

Kiu kiel junulo proksimume komence de la tridekaj jaroj malfermis sian profesion karieron ĉe la fervojo, certe ankoraŭ bone memoras, kiel memkomprenebla tiam estis posemajna deortempo de 54 horoj. Malgraŭ tio — aŭ eble ĝuste pro tio — la homoj multon sciis fari en sia libertempo, kiu laŭ nunaj postuloj estis neimageble malabunda. Sendube ankaŭ dum tiuj jaroj jam ekzistis amasinfluiloj. Sed ankoraŭ mankis la manipula faktoro de la televido. La homoj tiam (nur 40 jaroj pasis intertempe) estis multe pli „homoj“ ol hodiaŭ. Kaj multe pli ol nun ili estis pretaj fari ion mem, aktive pasigi sian libertempon. La kluboj, precipe tiuj, kiuj flegas kulturon, tiam ne bezonis lukti tiel rigore por povi ekzisti kiel hodiaŭ.

Libertempo hodiaŭ

Nuntempe ni laboras 42 horojn semajne. La libera sabato delonge estas memkomprenebla. La pli maljunaj aldone gajnis multe da libera tempo. Por la pli junaj ĝi estas nepra elemento de ilia vivo. Neniam ili konis alian staton. Aliaflanke ili ankaŭ neniam konis vivon sen la ŝarĝoj flanke de la moderna tekniko. Sed ĉiuj devas sukcese venki ilin ambaŭ, la ŝarĝojn kaj la liberan tempon, kiu ĉefe interesas nin en tiu konekso. Jes, ankaŭ la liberan tempon la homoj „venku“ - aŭ ĝi mortbatas ilin per sia plej terura armilo, la enuo. Kial do la homo strebas al libera tempo? Certe ne, ĉar li simple nenion deziras fari. Tio evidente estus iom tro primitiva. Sed per tio ne estu dirite, ke certa porcio da nenionfarado iam kaj tiam ne estus pozitiva kaj necesega elemento de la libertempo. Kiu hodiaŭ en sia profesio ankoraŭ rajtas plani? Kaj kiu eĉ travivas la ĝojon, mem rajti vivigi la planitan? Vere ne multaj. Kontraŭe, dum libera tempo ĉiu povas plani kaj formi, se li nur volas. Kiu ne konas la delikatan senton post sukcesinta agado, farita laŭ propra volo sen devigo? La memfarita nin plej multe gajigas kaj kontentigas.

Hobio-grupoj helpas

Ĉu ne en tio sin kaŝas sekreto de la homa esenco entute? Nome, ke ĉi tiu kreaĵo, al

Hobby — oder mehr?

(original in Esperanto)

Freizeit vor 40 Jahren

Wer als junger Mann, etwa Anfang der dreißiger Jahre, seine berufliche Tätigkeit bei der Eisenbahn begann, wird sich noch recht gut erinnern, wie selbstverständlich damals eine wöchentliche Dienstzeit von 54 Stunden erschien. Trotzdem — oder gerade deshalb — wußten die Menschen eine Menge mit ihrer für heutige Begriffe knappen Freizeit anzufangen. Zwar gab es auch in jenen Jahren schon Massenmedien. Aber noch fehlte der manipulierende Faktor des Fernsehens. Der Mensch war damals (nur 40 Jahre liegt das zurück) noch weitaus mehr „Mensch“ als heute. Und er war weit mehr als heute bereit, etwas selbst zu tun, die Freizeit aktiv zu gestalten. Die Vereine, und hier besonders jene, die Kultur pflegen, brauchten damals nicht so hart wie heute um ihr Bestehen zu ringen.

Freizeit heute

Heute arbeiten wir 42 Stunden in der Woche. Der freie Samstag ist längst zur Selbstverständlichkeit geworden. Die Älteren haben viel Freizeit hinzugewonnen. Für die Jüngeren ist sie ein unabdingbarer Bestandteil ihres Lebens. Sie haben es nie anders gewußt. Sie haben aber auch nie ein Leben ohne die Belastungen durch die moderne Technik kennengelernt. Alle aber müssen mit beiden fertig werden, mit den Belastungen und mit der Freizeit, die uns hier vorzugsweise interessiert. Ja, auch mit ihr muß der Mensch „fertig werden“ — oder sie erschlägt ihn mit ihrer schlimmsten Waffe, der Langeweile. Warum strebt der Mensch nach Freizeit? Gewiß nicht nur, weil er ganz einfach nichts tun will. Das wäre denn doch zu primitiv. Womit nicht gesagt sein soll, daß eine Dosis Nichtstun dann und wann nicht sogar ein positiver und notwendiger Bestandteil der Freizeit wäre. Wer darf denn heute im Beruf noch planen? Wer gar erlebt die Freude, Geplantes selbst gestalten zu dürfen? In der Freizeit dagegen kann jeder planen und gestalten, wenn er nur will. Wer kennt nicht das erhabene Gefühl nach einem gelungenen Vorhaben, das aus eigenem Antrieb ohne Zwang durchgeführt wurde? Das selbst Geschaffene macht froh und zufrieden.

Freizeitgruppen helfen

Liegt hier nicht ein Geheimnis des Menschlichen überhaupt? Nämlich, daß dieses

kiu estas donita la spirito, fine uzu ĝin? Sed car la ĉiutago, plena de tekniko kaj la komputeroj, kiuj vastskale direktas la homan konduton, apenaŭ ankoraŭ lasas al la spirito eblecojn por memkrea disvolviĝo, ĉu kontraŭ tio ne sin ofertas prudente utiligata libertempo kvazaŭ kiel ideala kompenso? Kaj ĉi-riilate ni fervojistoj estu bonŝancas, ke en niaj kulturfliegaj societoj de l'BSW estas hobia-grupoj je nia dispono, kiuj ĝuste tiun punkton de la homa vivo ekkonis kaj klopodas helpi. Pli ili ne kapablas fari. La agado nepre venu de la homoj mem, kaj nur el la sumo de tiu homa agado elkreskas la konsiderindaj rezultoj de tiuj societoj kun iliaj pozitivaj efikoj por la uopopuloj kaj plie por la homa socio.

Lingvo kiel esprimo de l'homa spirito

Nur tre malmultaj esprimoj de la homa spirito estas imageblaj sen lingvo. La lingvo estas la plej subtila instrumento de tiu spirito, sed ankaŭ tutsimpla ilo por komunikado. Tial la lingvo sur speciale alta nivelo devus plenumi ĉi tiujn taskojn sur nia akirita de la tekniko terĝlobo, kies distancoj de ĝuste tiu tekniko estas bagateligitaj ĝis sensignifo. Sed kio okazas vere? Pli kaj pli kelke da malmultaj grandaj nacioj provas pere de sia politika influo doni kreskantan influon ankaŭ al siaj lingvoj, ĉar inverse helpe de la lingvo estas trudebla ĉia influo al aliaj. Tiu ĉi konduto neniel estas nova, nur nuntempe ĝi estas praktikita per pli efika premo. Pro tio oni rigardu kiel netrotakseblan meriton de la pola okulkuracisto d-ro L. Zamenhof, ke li kiel juna homo jam en la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento ekkonis tiun perfortan metodon kaj dediĉis sian tutan pluran vivon al la celo, disponigi al la homaro kontraŭ-rimedon, kiun li baptis „Lingvo Internacia“. Tiu sub la nomo „Esperanto“ ĝenerale konata lingvo ne nur postvivis dum 85 jaroj plej fortajn atakojn kaj misfamigojn, du mondmilitojn, multnombrajn malpermesojn, aŭtodafeojn por sia literaturo kaj koncentrejojn por siaj membroj, male, ĝi fariĝis milionope provita kaj pruvita rimedo, ebligi rektajn personajn kontaktojn al homoj de ĉiuj

Wesen, dem der Geist gegeben ist, diesen auch benutzen möge? Weil aber technischer Alltag und weithin computergesteuertes Verhalten dem Geist kaum noch Möglichkeiten schöpferischer Entfaltung lassen, bietet sich da eine klug genutzte Freizeit nicht geradezu als idealer Ausgleich an? Und insofern sind wir Eisenbahner glücklich zu preisen, daß uns im BSW Freizeitgruppen zur Verfügung stehen, die gerade diesen Punkt erkannt haben und Hilfestellung geben wollen. Mehr können sie nicht. Das Tun muß von Menschen selbst kommen, und erst aus der Summe dieses Tuns erwachsen die beachtlichen Leistungen dieser Gruppen mit all ihren positiven Auswirkungen auf den einzelnen und darüber hinaus auf die menschliche Gemeinschaft.

Sprache als Ausdrucksmittel menschlichen Geistes

Nun sind aber nur sehr wenige Äußerungen des Geistes ohne Sprache denkbar. Die Sprache ist das feinste Ausdrucksmittel menschlichen Geistes, aber andererseits auch ganz einfach Mittel zur Mitteilung. Sie müßte deshalb auf unserem von den Kräften der Technik eroberten Erdball, dessen Entfernungen von eben dieser Technik bis zur Bedeutungslosigkeit bagatellisiert werden, diese Aufgabe in besonders vollkommener Weise erfüllen. Was aber geschieht wirklich? Mehr und mehr versuchen einige wenige große Nationen, über ihren politischen Einfluß auch ihrer Sprache zunehmendes Gewicht zu verschaffen, weil über die Sprache umgekehrt wiederum jeglicher politische und kulturelle Einfluß auf andere erhöht werden kann. Dieses Verhalten ist nicht neu, es wird nur heute mit größerem Nachdruck praktiziert. Darum ist es ein großes Verdienst des polnischen Augenarztes Dr. L. Zamenhof, daß er als junger Mann in den achtziger Jahren des vorigen Jahrhunderts diese sprachliche Vergewaltigung bereits erkannte und sein ganzes weiteres Leben dem Ziel widmete, der Menschheit ein Gegenmittel in die Hand zu geben, das er „Lingvo Internacia“ (Internationale Sprache) nannte. Diese allgemein unter dem Namen „Esperanto“ bekannte Sprache hat nicht nur 85 Jahre heftigster Attacken und Diffamierungen, zwei Weltkriege, zahlreiche Verbote, Scheiterhaufen für ihre Literatur und Konzentrationslager für ihre Mitglieder überstanden, sie hat sich vielmehr zu einem millionenfach mit Erfolg erprobten Mittel entwickelt, Menschen

klasoj, kun ĉiuj ajn opinioj kaj el ĉiuj popoloj. Kaj rekte interparoli signifas ekkapabli interkompreniĝi, do signifas kompreni la alian, ne nur ties vortojn, sed tion en li, kio normale restas sekreto por eksterlandano.

Fervojistaj esperantistoj jam de 1909

Homoj, kiuj lernas kaj aplikas Esperanton, ekzistas en preskaŭ ĉiuj landoj de la tero. Multaj el ili kolektiĝis en organizaĵoj, kies gvida estas la Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĝi estas samtempe tegmenta ligo por konsiderinda nombro de pli malgrandaj asocioj specialigitaj indirekten, ekzemple tiaj de la instruistoj, juristoj kaj ankaŭ de la fervojistoj. Jam de la jaro 1909 ekzistas la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF). Ĝia germana landa asocio dekomence plenforte kunlaboris kaj nun portas la nomon „Germana Esperanta Fervojista Asocio en la Sociala Organizo de la DB“. Jam en 1947 ĝi nove aktiviĝis kaj estis akceptita en 1949 kiel libertempa societo en la fervoja kultura Organizo BSW. Pli kaj pli tiu germana asocio transprenis gravajn poziciojn en la internacia federacio kaj nun por ĝi ankaŭ disponigas estraranojn. Post kiam pli poste estis fondita la FISAIC (Internacia Federacio de kulturflegantaj fervojistoj), la fervoistaj espereantistoj trans BSW-on ankaŭ tie estis anigitaj. Nia bildo montras la organizaĵajn koneksojn kaj multflankajn interplektojn. La germana asocio estas gvidata, kiel kutime en BSW, de komisiitoj, kiuj respondecas al la respektivaj BSW-oficejoj. Kontraŭe la internacia federacio IFEFF havas kvinkapan estraron elektitan de la delegita komitato de ĉiuj landaj asocioj. Laŭstatute ĝi devas plenumi la decidojn de la delegitoj. El la 19 landaj asocioj 6 apartenas al socialistaj landoj.

La forto de l'Internacia Lingvo

Ĝuste tiu lasta fakto substrekas la kunligan forton de la Internacia Lingvo. Organizaĵo tamen ne estu memcelo, sed rimedo al celo. Same ĉikaze la esperan-

jeglicher Klassen, Einstellung und aus allen Völkern direkte persönliche Kontakte zu ermöglichen. Direkt miteinander sprechen aber heißt sich verständigen, fähig werden, den anderen zu verstehen, nicht nur seine Worte, sondern das an ihm, was dem Ausländer normalerweise verschlossen bleibt.

Eisenbahner-Esperantisten schon seit 1909

Menschen, die die Internationale Sprache erlernen und anwenden, gibt es in fast allen Ländern der Erde. Viele von ihnen haben sich in Organisationen zusammengeschlossen, deren führende der „Allgemeine Esperanto-Weltbund“ (Universala Esperanto-Asocio/UEA) ist. UEA ist gleichzeitig Dachverband für eine stattliche Anzahl kleinerer Verbände, die sich nach irgendeiner Richtung spezialisiert haben, wie z. B. Lehrer, Juristen und auch die Eisenbahner. Bereits seit dem Jahre 1909 gibt es einen „Internationalen Verband der Eisenbahner-Esperantisten“ (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio/IFEFF). Sein deutscher Landesverband hat von Anfang an tatkräftig mitgearbeitet und trägt heute den Namen „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk“. Schon 1947 wurde die Vereinigung wieder aktiv und 1949 als Freizeitgruppe ins damalige Reichsbahn-Sozialwerk aufgenommen. Mehr und mehr übernahm der deutsche Landesverband wichtige Positionen im internationalen Dachverband und stellt heute auch Vorstandsmitglieder. Nachdem später die FISAIC (Internationale Vereinigung kulturflegender Eisenbahner) entstanden war, wurden die Eisenbahner-Esperantisten auch dort mit eingegliedert. Unser Schaubild zeigt die organisatorischen Zusammenhänge und vielseitigen Verflechtungen. Die deutsche Vereinigung wird, wie im BSW üblich, von Beauftragten geführt, die den BSW-Stellen verantwortlich sind. Der internationale Dachverband IFEFF dagegen hat einen von der Delegiertenversammlung aller Landesverbände gewählten fünfköpfigen internationalen Vorstand, der nach der Satzung gehalten ist, die Beschlüsse der Delegierten auszuführen. Von den 19 Landesverbänden gehören sechs sozialistischen Ländern an.

Die Stärke der Internationalen Sprache

Gerade diese letzte Tatsache unterstreicht die verbindende Kraft der Internationalen Sprache. Organisation darf jedoch nicht Selbstzweck sein, sondern nur Mittel zum Zweck. So auch hier. Die Eisenbahner-

tistoj fervojistaj unuavice celas konvinki fervojajn kompaniojn kaj ties klientojn, ke ci tiu lingvo estas taŭga rimedo por ekonomie venki la sennombrajn lingvajn komplikaĵojn en la internacia trafiko. Kiel premiso estas kreendaj fervojaj fakvortoj (terminoj) devigaj en la tuta mondo. Tio estas giganta laboro, kiam oni pripensas, ke ĝi devos esti farita ekskluzive post la profesia farado kaj ke la kunlaborantoj vivas dise en multaj landoj. Ĝia amplekso el tio estas ekkonebla, ke la kiel bazo servanta terminaro seslingva de l'Internacia Fervoja Unuiĝo (UIC) enhavas pli ol 11 000 terminojn. Por pli rapide atingi almenaŭ partan rezulton, la germana asocio en 1966 eldonis malgrandan fakvortareton kun proksimume 2000 terminoj, al kiu intertempe sekvis similaj eldonaĵoj en Hungarujo, Jugoslavio, Nederlando kaj Norvegujo. Ankaŭ internaciaj reglamentoj estas tradukitaj. En pluraj landoj oni trovas la horarŝlosilon kaj esperantolingvajn prospektojn eldonitajn de fervojaj kompanioj. Ili precipe en iom malgrandaj landoj estas tre ŝatataj. La membroj de la internacia federacio estas fervojistoj de ĉiuj kategorioj. Por plifaciligi al ili la deziritajn kontaktojn, la federacio ĉiujare okazigas internacian kongreson, kie aktualaj fakaj temoj de la gastlando estas traktataj kaj fakaj ekskursoj pliriĉigas la sciojn de la partoprenantoj. Ankaŭ la turismaj allogaĵoj de tiuj kongresoj ĉiam postlasas neforgeseblajn impresojn. Plej grava rezulto tamen estas sennombraj personaj ligoj kaj dumvivaj amikaj kontaktoj trans ĉiujn limojn.

Lingva matematiko — lingva ĝuo

Sed ni revenu al la elirpunkto de nia traktajo. Ĉu oni rigardas la Internacian Lingvon el idealisma aŭ realisma starpunkto, tute egale, ĉiukaze oni unue devas ĝin lerni, antaŭ ol oni kapablas ĝui ĝin. Tamen ĝuste en ĉi tiu punkto ĝi ne estas komparebla kun iu ajn alia lingvo. Per dekono de la penado kutime necesa por studado de fremda lingvo, oni alproprigas al si Esperanton. Kaj jen io, kio donas sencon al nia libera tempo, sen komplete okupi ĝin. Tre rapide ni rimarkos, ke nia streĉado

Esperantisten haben in erster Linie das Ziel, Eisenbahn-Verwaltungen und deren Kunden davon zu überzeugen, daß diese Sprache das geeignete Mittel zur ökonomischen Überwindung der zahllosen sprachlichen Schwierigkeiten im internationalen Verkehr ist. Als Voraussetzung dafür müssen in aller Welt verbindliche Fachausdrücke des Eisenbahnwesens geschaffen werden. Das ist ein gigantisches Vorhaben, wenn man bedenkt, daß es ausschließlich in der Freizeit ausgeführt wird und die Mitarbeiter in vielen Ländern verstreut leben. Sein Umfang geht schon daraus hervor, daß das als Grundlage dienende sechssprachige Fachwörterbuch des Internationalen Eisenbahnverbandes (UIC) über 11 000 Wörter enthält. Um schneller zu einem Teilerfolg zu kommen, brachte der deutsche Verband im Jahre 1966 ein etwa 2000 Begriffe umfassendes Fachwörterbüchlein heraus, dem unterdessen ähnliche Ausgaben in Holland, Jugoslawien, Norwegen und Ungarn gefolgt sind. Auch internationale Dienstvorschriften sind übersetzt worden. In mehreren Ländern findet man den Kursbuchschlüssel und Werbeprospekte in Esperanto, die besonders in den kleineren Ländern sehr beliebt sind. Die Mitglieder des internationalen Verbandes sind Eisenbahner aller Sparten. Um ihnen die gewünschten Kontakte zu erleichtern, veranstaltet der Verband alljährlich in einem anderen Lande einen internationalen Kongreß, wo aktuelle fachliche Themen des Gastlandes behandelt werden und fachliche Exkursionen das Wissen der Teilnehmer bereichern. Die touristischen Attraktionen dieser Kongresse hinterlassen immer wieder unvergeßliche Eindrücke. Wichtigstes Ergebnis aber sind unzählige persönliche Bindungen und lebenslange Freundschaften über alle Grenzen hinweg.

Sprachliche Mathematik — sprachlicher Genuß

Kehren wir zum Ausgangspunkt unserer Betrachtung zurück. Ob man die Internationale Sprache vom ideellen oder praktischen Standpunkt aus sieht, in jedem Falle muß man sie zunächst erlernen, bevor man Freude an ihr hat. Doch gerade in diesem Punkt ist sie mit keiner anderen Sprache vergleichbar. Mit einem Zehntel des Aufwands, der für das Erlernen einer Fremdsprache notwendig ist, eignet man sich Esperanto an. Und hier ist etwas, das unserer Freizeit einen Sinn gibt, ohne sie vollends mit Beschlag zu belegen. Sehr

valoras, kiel ni enpenetras en la frapantan logikon de tiu — oni deziras diri — lingva matematiko, kiu post ioma tempo malkaŝas sin kiel vivplena fleksebla lingvaĵo. Kaj jen la punkto, ni opinias, kie nia liber-tempa okupado kreskas trans nuran hobion. Kiam ni estos atingintaj tiun pozicion, ni ne nur „ĝuos“ la normalan praktikon de tiu lingvo, sed ni kapablos kontribui per niaj kontaktoj al fakta interkompreniĝo, pri kiu oni tiom multe parolas, sed kiun oni ne povas praktiki, ĉar tutsimple ne povas paroli unu kun la alia.

Diskriminacio kaj ĝia forigo

En la jaro 1948 la Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarta de la Homaj Rajtoj interalie fiksas, ke neniu rajtas diskriminacii iun pro ties lingvo. Sed kion alian ol diskriminacion signifas la devigo, devi intertrakti kun aliaj en ties gepatra lingvo. Tute egale, ĉu tio koncernas al unuopaj personoj aŭ al tutaj popoloj. Oni studu ĉi-rilate la artikolon n-ro 8 de la statuto de l'RIV (Internacia Konvencio pri la reciproka uzado de varvagonoj), kaj oni scias, pri kio temas. Kial do ne elekti lingvon, kiu al ĉiuj donos la samajn startkondiĉojn kaj — tio aparte estu akcentita — estas lernebla por ĉiu ordinara homo? Lingvo pro kies lernado oni ne devas frekventi gimnazion, sed kiun oni povas konkeri en propra lando, ja eĉ en la propra loĝejo tiom perfekte, ke oni baldaŭ povos uzi ĝin sukcesplene, tute male al ĉiuj aliaj fremdlingvoj. Kaj kial vi, estimata leganto, ne estu inter tiuj homoj, al kiuj la lingvo Esperanto ofertos novan enhavon por ilia libera tempo, unue dum la lernado, poste dum la uzado? Provu, kaj vi spertos, ke la Internacia Lingvo estas pli ol hobio por persona ĝojigo. Ĝi estas unu el tiuj iloj, kiujn la homaro urĝe bezonas por vera progreso.

Joachim Giessner

bald werden wir bemerken, wie sich unsere Mühe lohnt, wie wir eindringen in

die verblüffende Logik dieser, fast möchte man sagen, sprachlichen Mathematik, die sich nach geraumer Zeit als lebendiges, biegsames Ausdrucksmittel offenbart. Hier aber, so meinen wir, wächst unsere Freizeitbeschäftigung über das Nur-Hobby hinaus. Wenn wir soweit sind, werden wir nicht nur die „reale Praxis“ dieser Sprache genießen, sondern dann sind wir in der Lage, mit unseren Kontakten beizutragen zur praktischen Verständigung, von der man, ach, so viel redet, die man aber gar nicht praktiziert, weil man einfach nicht miteinander sprechen kann.


Diskriminierung und ihre Beseitigung

Im Jahre 1948 legten die Vereinten Nationen in der Charta der Menschenrechte auch fest, daß niemand seiner Sprache wegen diskriminiert werden dürfe. Was aber ist der Zwang, mit anderen in deren Muttersprache verkehren zu müssen, anderes als sprachliche Diskriminierung? Ganz gleich, ob das für einzelne Personen oder ganze Völker zutrifft. Man studiere einmal den Artikel 8 der Satzung zum RIV (Internationales Übereinkommen über die gegenseitige Benutzung der Güterwagen) und man wird wissen, was gemeint ist. Warum nicht endlich eine Sprache, die allen die gleichen Startbedingungen zugesteht und — das sei betont — auch für den „kleinen Mann“ erlernbar ist? Eine Sprache, deretwegen man kein Gymnasium zu bemühen braucht, die man sich sehr wohl im eigenen Lande, ja sogar in der eigenen Wohnung so gut aneignen kann, daß man sie bald mit Erfolg benutzt. Dies ganz im Gegensatz zu allen sonstigen Fremdsprachen. Und warum sollten Sie, verehrter Leser, nicht unter denen sein, denen diese Sprache einen neuen Inhalt Ihrer Freizeit bietet, erst beim Lernen, dann bei der Anwendung? Versuchen Sie es! Sie werden entdecken, daß die internationale Sprache Esperanto mehr als nur ein Hobby zur persönlichen Freude ist. Sie ist eines der Werkzeuge, deren die Menschheit für den wirklichen Fortschritt dringend bedarf.


Wo und wie lernen wir am schnellsten die Internationale Sprache?

1. Jede Ortsstelle des BSW vermittelt Name und Fernsprechnummer des zuständigen Bezirksbeauftragten für Esperanto, der weitere Auskünfte gibt.
2. Wer aus persönlichen oder dienstlichen Gründen keinen Kurs besuchen kann, für den gibt es einen ausgezeichneten und äußerst preiswerten Fernkurs, bestehend aus 4 Lehrstoffheften und 4 Schallplatten, Preis 23,— DM. Bitte bestellen Sie bei Hermann Behrmann, 4972 Löhne-Obernbeck, Bahnhofstraße 54. Vergessen Sie aber nicht, hiervon Ihren Bezirksbeauftragten zu verständigen, damit er Sie betreuen kann.

Organisationsschema der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Mitarbeit in folgenden Organisationen



*) UEA hat ein Netz von 3000 Delegierten (Helfern) in über 60 Ländern, deren Anschriften alljährlich in einem Jahrbuch bekanntgegeben werden. Darunter befinden sich 100 Eisenbahn-Fachdelegierte. Diese Helfer stehen allen Mitgliedern mit Rat und Tat zur Verfügung.

13a Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno en Spitzingsee

Bruna neĝo — gajaj homoj

Skion kaj sekurligilon vi certe konas, sed se vi scias krome, kiam oni devas eĝi, tordi aŭ preferi starigi sin laŭpluge, vi certe ne estus havintaj miajn malfacilaĵojn.

En skihotelo „Willi-Merkel-Heim“ apud Spitzingsee, neĝocerta regiono en alteco de 1100 m, eĉ en tiu bruna vintro, kun iom da peno 72 gefervojistoj trovis ĉiujn eblojn ekzerci sin pri skiado, promenado kaj lingva perfektigo. Unuan fojon GEFA transprenis la taskon organizi la jam tradician, ĉar 13an skisemajnon de IFEF. Ne simpla tasko, ĉar la famo de la pasintaj ne facile estis atingebla. Mi estis tute nova en tiu rondo, mi do ne havas antaŭjuĝojn kaj plenkonvinkite povas jesi sukceson de la aranĝo. El 6 nacioj alvojaĝis la skiemultoj, la plej granda grupo venis el Francio, inter ili la plej aĝa sed kuraĝa, kaj la plej juna persono.

Frank Gießner kiel oficiala skiinstruisto kun multaj bonvolemaj helpantoj klopodis al la tute novaj aŭ jam iomete spertaj skiistoj, peri la teknikon por konkursi en unu el la venontaj olimpikaj ludoj. Kuraĝo ne mankis al la instruistaro, sed ĉu ili estis ĉiam sinceraj, laŭdante la malfeliĉulojn, kiuj post sennombraj faloj hazarde sukcesis foje starante malsuprengliti la deklivon, pri tio ne nur mi dubas. La spertuloj veturis per seĝolifto la „Stümpfling“ supren, kie kelkloke la neĝo estis ankoraŭ ideala. Tamen, veturante malsupren la kuraĝuloj devis barakti kontraŭ ŝlimo, glacio kaj rokoj. Hazarde, bonŝance aŭ dank' al la

skiprotektanto „Ullr“, konvene elektita por la 13. IFES, malgraŭ tiaj obstakloj krom multaj blujaj makuloj kaj kelkaj trofleksitaj artikoj, la solan piedorompon suferis pasia neskiisto.

Tiujn dumtagajn streĉojn sekvis vesperaj ludoj, novajoj el radio Erivan, prezentado de diapozitivaj, lingva konkurso, popoldanco, kantoj kaj la neforge-sebla karnavala vespero. Majstro de la plezuro, ĉiam

helpe de bone elektitaj diapozitivaj konstruon kaj funkcion de aerkusena ŝipo, trafikanta inter la kontinento kaj la brita insulo. La lingva konkurso, iom laciga klopodo paroligi eĉ la plej silenteman komentanton, tamen malkovris kelkajn oratorajn talentojn, eĉ kandidatojn por nova UEA-prezidenteco. Por la juĝa komisiono ne estis simple decidi, kion pli alte taksi, lingvan kapablon, komikan prezenton aŭ se-



Alveno en Spitzingsee

preta, neniel embarasigebla estis nia franca amiko Gérard Horn. Lerte li kondukis nin de unu programero al alia tra la diversaj vesperoj. Dum la prezentado de diapozitivaj oni ruze klopodis klerigi nin. Inter serio da bildoj el Germanio, memoroj pri la lastjara IFES en Chatel kaj bildoj pri la pasintaj skisemajnoj en Werfenweng, k-go de Bruin klarigis al ni

neraran pakeradon. La pariza junulara dancgrupo, vojaĝis kun ni tra Eŭropo kaj montris dancojn el Francio, Jugoslavio, Bavario kaj Germanio. De la aplaŭdo kuraĝigitaj ili riskis instrui ankaŭ la publikon, danĝera ne nur por la piedoj dum la bavara frapdanco. Ofte kaj volonte oni uzis la lerte kompilitan kantkajeron, en kiu tamen mankis la plej ofte kantata „... à la Ba-

stille", supozeble pro sia malrevolucia nedeca enhavo.

Pri la mastrumaj kapabloj de nia kasisto ekzistas nenia dubo, tamen la entuziasmo pri la neatendita vinregalo antaŭ la balvespero ankaŭ lin surprizis. Dum la polonezo la malsaĝuloj, multaj nerezoneble maskitaj, prezentis sin; 11 virinoj konsistigis la malsaĝan konsilantaron. Ne mankis ordenoj, ĉefe nutraj — ĉar marcipanaj: por Elfriede „la bona animo —“, Gérard „la bona spirito —“, kaj Frank „la bona fantomo de la semajno“. Kuraĝigan suĉbombonon kun la olimpikaj ringoj ricevvis Happi, kiu post sennombraj faloj ĉiam gaje releviĝis sur la bretoj. Kiam je la 2-a nokte, post unuhora neprograma aldono la muzikistoj definitive enpakis la instrumentojn kaj la estrino jam movis la balailon, resto de la nelacigebla frenezularo post vana klopodo daŭrigi en apudaj dancejoj „Spinnradl“ kaj „Wurzhitn“ trovis lastan retirejon en la subtegmentejo bedaŭrinde malbone sonizolita. Je la 4-a estis absoluta fino kaj la venintan matenon multaj libervole rezignis pri la matenmanĝo. La lastan vesperon elektis niaj francaj gekolegoj, ebligi al ni rigardon antaŭ kaj malantaŭ la televidan ekranon. Denise kaj Gérard komentis veterprognozojn, politikajn aktualaĵojn, reklamis pri la novaj verdstelaj viraj subvestoj (ni atentis pri Roberto, ke reklamofirmao ne fordonu lin kiel manekanon). La plej novaj inaj vestaĵoj ne plu restis sekretaj; dum la boksprezento Josefo kaj Roberto sukcesis komune venki la abitracion. Fine ne mankis koncerto, majstre direktata de Johano Mevel, kiu helpe de

bonega orkestro (kiel belsona estas violono el kartonkestaĉo), ĝojigis niajn orelojn per moderna muziko. Larmoj fluis pro ridado pri la amuza prezento, kies ideon lastjare havis k-go Delaquaize, baptante ĝin „radio krokodilo“, kiu ĉijare evoluis al „tele-krokodilo“.

Neniu kongreso, seminario aŭ skisemajno sen ekskurso. Planita estis tuttaga al „Wendelstein“, certe bombono por ĉiu skiemulo same kiel por la promenantoj. Sed ankaŭ tie la vintro estis milda, kaj pro manko de neĝo ni decidis pri duontaga ekskurso preter la lagoj Schliersee kaj Tegernsee kun duhora halto en la fama Rottach-Egern. La enaŭtobusiĝo apenaŭ valoris, ĉar post kelkaj

minutoj da veturado ni denove eliris por viziti la iaman Benediktiner-abatejon Tegernsee fonditan jam en la 8-a jarcento kun preĝejo malfrugotika kaj baroka interno. Eble ankaŭ heredaĵo de la monaĥoj estas la recepto pri bierfarado, kiun la duka bavara bierfarejo produktas kaj proponas tuj apude. Ne maltrankviligita de enbotelgado aŭ transporto, la gusto estas speciale bona kaj trinkiga. Tie ni ankaŭ lernis de nia aŭtobus-ŝoforo la utilon de naztabako. Preĉipe la inoj devis tuj provi ĝin. La tiklado tiom plaĉis, ke en Spitzingsee naztabako baldaŭ poste elvendiĝis. La reveturo estis ege gaja. La ŝoforo, Miezi, Ginette kaj Elzbieta jodlis kaj solkantis hejmen. Specialan kom-



Ĉe la karnevala vespero en Spitzingsee
Post la festo lacaj batalantoj

plimenton ni aŭdis de nia ŝoforo, kiu la vesperon post la ekskurso pasigis inter ni. Ege impresis lin la multnacieco de la pasaĝeroj kaj ilia facila interkomunikado. Antaŭ redaktifino atingis nin ankoraŭ la respondo de radio Erivan al la demando: „Ĉu ĝustas, ke la urbo Soltau donacis pro liaj filatelaj meritoj sian oran lupeon al nia kolego BHS Werner Heimlich?“ Respondo: „Principe jes! Sed ni devas konstati, ke la honora evento ne okazis en Soltau sed en Spitzingsee, ke due ne pro meritoj filatelaj, sed kapabloj en skiado kaj lingva uzo, ke trie ne estis ora lupeo sed arĝenta pokalo. Kaj ankoraŭ malgrava korekto: temas pri Werner Heimlich, la filo, tamen parenca.“

Margret

Esperanto-Bund in Luxemburg

Am 29. Januar hielt der kürzlich gegründete Luxemburger Esperanto-Bund in Esch-sur-Alzette seine erste Generalversammlung ab. Zum Vorsitzenden wurde Marcel Ries, Dudelange, gewählt. Es wurde bekannt, daß der neugegründete Bund in Luxemburg auf reges Interesse stößt. Um die Gründung des Bundes hat sich besonders der westdeutsche Lehrer Hermann Behrmann, Löhne, verdient gemacht. Fast alle neuen Luxemburger Esperantisten lernen Esperanto nach der von Hermann Behrmann geschaffenen Esperanto-Lehrmethode „Esperanto programita“. Mit Luxemburg bestehen nunmehr in allen Ländern des „Europas der Zehn“ Esperanto-Landesverbände. Für 1972 und 1973 sind bereits europäische Esperanto-Veranstaltungen in Luxemburg geplant.

el: Pilo-press

Nekrologo

Post nur mallonga mal-sano forlasis nin nia amiko.

Wilhelm Schubert

Li naskiĝis la 12. 3. 1899 kaj mortis la 20. 1. 1972 en Köln. En 1910 li esperantiĝis kaj estis membro de UEA, GEA, IFEF kaj kunfondinto de GEFA. Tiu simpatia, bonkora kaj grandanima homo ĉiam estis helpopreta kaj bonhumora. Kiel „sinjoro cigaro“ li estis konata figuro en niaj kongresoj. Ni ege bedaŭras, ke li neniam plu estas inter ni, sed ni konservos pri li bonan memoron.

Li ripozu en paco!

Al la familianoj ni sincere kondolencas.

El la grupoj

Münster. Ridado, dancado kaj ĝojo regis en la BSW-kunveno de Münster la 22an de januaro, kiam la Fervojista Esperanto-Rondo festis sian duan tradician karnavalon. La invitilo promesis, ke okazos „plej idiota karnavala festo“. Tute klare, ke en tiu kazo multaj grupanoj ĉeestis kaj krome frenezuloj venis eĉ el Burgsteinfurt, Herbern, Schwelm, Osnabrück, kaj ankaŭ delegitoj de LIFKAŬ ne mankis. La ejon oni impone dekoris kaj la ampleksajn muzikaparatojn prizorgis la lerta diskojokeo Güido. Skriban saluton sendis la IFEF-prezidanto spirite ĉeestanta. Eĉ el Nordsvedio venis humora kaj ilustrita letero. Yngve Forslund sendube apartenas laŭ la koro al la karnavala societo.

Kun granda aplaŭdo la ĉeestantoj akceptis la mal-

saĝan konsilantaron. Nun okazis senthalta unika programo. Unue Judith rakontis kiel juna patrino pri siaj ĉagrenoj kun la infanoj. Kriemhild kaj Judith montris la malfacilan arton de pantomimo. Gertrud kaj Otto ankaŭ sciigis strangan, sed humurajn aventurojn kaj ludis skeĉojn. El la gaja fervojisto vivo rakontis en saksa lingvo Heinz Schindler, Kriemhild rolis kiel majstrino de plezuro. Margret kaj Willi faris kvaŝaŭ la punkton sur la literon „i“. Kiel kampanoj ili ŝercis, kantis, trinkis kaj fumis, kompreneble en tradiciaj folkloraj kostumoj. Jen sensacio: Willi eĉ lernis dum tiu spektaklo la Internacian Lingvon en kvar minutoj.

La gastigantoj malavare regalas la gajan, verdan popolon; treege bongustis la vino; bona etoso regis. Oni amuziĝis kaj dancadis. Helaŭ kaj aŭ-aŭ ĝis al la venanta festo! — roe —

Nürnberg. Kvindeko da esperantistoj el Norda Bavario kunvenis la 27. 2. 1972 en konferencĉambro de la Majstro-Kantista Halo de Nürnberg, inter ili multaj fervojistoj-esperantistoj. Oni aŭdis raporton pri la IFEF-kongresoj en Rimini kaj Maribor kaj filmon pri E-kongresoj Nürnberg kaj Vieno. Krome oni aŭskultis al la Varsovia Esperanto-Ekspreso. La Nürnbergaj kunvenoj fariĝas pli kaj pli popularaj.

La trafikoficejo de Mannheim eldonis novan esperantlingan faldfolion de Mannheim en eldonkvanto de 20 000 ekzempleroj. La loka grupo distribuas la prospektojn senpage. Skribu al: ESPERANTO, 68 Mannheim 1, T 6/18.

Stuttgart. Sabaton, 19. 2. 1972 je la 16.15 h, okazis en Biberach, gastejo „Zum Biber“ la jarkunveno de fervojistoj-esperantistoj de la fervojista distrikto Stuttgart. El la programo: Informoj pri la IFEF-kongreso en Lugano, prelego de d-ro Breuninger, Ulm, pri kibernetiko, filmoj en Esperanto pri Aŭstralio, muziko kaj danco.

Wuppertal. Revelo, la Esperanto-ligo en la regiono de Rejnlando-Vestfalia, invitis al kunveno en Wuppertal-Elberfeld, „Jugendzentrum Elberfeld“, Auerschulstr. 9, por dimanĉo, 12 marto 1972, je la 10a horo.

En la kadro de la kunveno okazis la jarkunveno de Revelo, prelegoj de d-ro Maizten kaj G. Winkler kaj „Tejo-Esperanto-junularo hodiaŭ“.

Ein in unseren Esperanto-Kreisen gern gesehener Gast, Herr Ralph Harry, Botschafter Australiens in der Bundesrepublik, hat zugesagt, am Sonntag, dem 23. 4. 1972, in Begleitung seiner Gattin, nach Hagen i. W. zu kommen. Die Stadt Hagen wird zu einem Empfang einladen, der um 14.30 Uhr stattfindet.

Nach dem Empfang wird der Botschafter Filme über „Australien, Land fortwährenden Wechsels“ und über Canberra in Esperanto bzw. in deutscher Sprache vorführen. Ein Gespräch über die Verbindungen zwischen Australien und der Bundesrepublik, über die australische Stadt „Hagen“ und über Canberra schließen sich an.


Interessenten werden hierzu herzlich eingeladen.

Distrikt-komisiito en Wuppertal

En la jaro 1957 mi legis anoncon en „DB-Amtsblatt

Wuppertal“ pri Esperanto-kurso por komencantoj. La kurso ĝuis la protekton de la iama direktoro de ĉefriparejo Opladen.

Instruis la iama distrikt-komisiito Alfred Dawid. Komence partoprenis tridek gelernantoj. Sed tre baldaŭ evitentiĝis, ke la kurso ne sukcesos. Post mallonga tempo ni estis inter kvar fiduluj. Mi sukcesis trovi en la Esperantogrupo Solingen instruanton. Nun mi



W. Graß

rapide plenumis mian kurson. Kolego Dawid maljuniĝis kaj iutage li petis, ŝargi sian oficon sur pli junajn ŝultrojn. Mi akceptis kaj ek de la jaro 1958 mi gvidas kiel komisiito la fervojistan esperantistaron de la distrikto Wuppertal. Tiu ci distrikto estas tre ampleksa. Ĝi etendiĝas preskaŭ de Köln ĝis Kassel. Komence mi ankaŭ kelkfoje instruis sed intertempe formiĝis memstaraj grupoj en Schwelm kaj Hagen.

Nun tie transprenis agemaj kaj lertaj kolegoj multan laboron.

Ek de la Aarhusa kongreso en la jaro 1958 mi vizitis kun mia edzino ĉiujn IFEF-

kongresojn kaj GEFA-jarkunvenojn. Pro manko da tempo ne ĉiam estas eble, viziti ĉiujn internaciajn kongresojn.

Grandnombra fariĝis la rondo de miaj gekonatuloj per tio, kaj la etoso kaj solidareco en niaj rondoj efikis eĉ en mia privata vivo.

Antaŭ kvin jaroj mi prenis el la manoj de kolego Barnickel la oficon de la GEFA-redaktoro. Per tiu ĉi ofico mi havas ĉiutagan kontakton kun la internacia esperantista kolegaro.

Versajne 1972 finiĝos mia laboro en Wuppertal ĉar la distrikto nuliĝos.

Pro tio: Ĝis revido en alia regiono.

Turismo

Ferio-semajno dum la tagoj 22. - 25. 4. 1972 okazos en Wijk aan Zee. Tranoktado kaj manĝoj en la bona kaj bela hotelo Kennemerduin. Totala prezo: 165 n.guldenoj. Detalojn kontraŭ alsendo de int.resp.kupono alsendos Thies M. Blaauw, Grensiaan 13, Zwolle, Nederlando.

Hungara Esperanto Asocio invitas vin al Hungario.

En julio 1972 estos organizataj Esperanto-Semajnoj en tri diversaj partoj de Hungario, nome en Budapeŝto, en Gyula kaj en la vilaĝo Abaliget, 200 km. sudokcidente de Budapeŝto. Detalan informon petu de: HEA 3-a Teritoria Komitato, Poŝtfako 2 Pecs 1, Hungario. (el: IF 1/72)

Anoncoj

Studentino Eva Chvostová, Engelsova 289, Podebrady CSSR, petas kontribuojn por disertacio kun temo: metodo certigi plej konvenan funkcikablon de elektraĵoj kaj motoraj lokomotivoj. Bonvolu helpi kaj skribi ĝis 30. 9. 1972.

Atentul Kunveturu en la Ardenojn!

Trilanda jarkunveno en la urbeto

Clervaux (Clertf)

en norda Luksemburgo
6a ĝis 9a de oktobro 1972
komune aranĝita de la
belga, franca kaj germana
landaj asocioj

Provizora programo

6. 10. gazetara kunveno
malfermo de ekspozicio
estrarkunvenoj
7. 10. antaŭtagmeze laborkunsidoj
kaj ekskurso
posttagmeze plenkunsido
kultura verspero kun orĥestro,
ĥoro, solistoj, dancgrupo
kaj dancado por ĉiuj
8. 10. Ekumena diservo
kronhonorigo ĉe la loka
monumento
akcepto flanke de la urbo
tuttaga ekskurso
9. 10. komuna vojaĝo al la urbo
Luksemburgo kun ties vizito.
Tie fino tagmeze.

Ni rekomendas jam nun rezervi la tagojn por tiu mini-kongreso, kiu okazos en belega pejzaĝo kaj kies celo estas, helpi al la ĵus fondita Luksemburga Esperanto-Asocio kaj prepari la terenon por fondota nova IFEF-landa asocio.

Nova IFEF-membro el Nov
Zelando deziras korespondi
kun germanoj gekolegoj.

Nia kolego estas 40 jaraĝa
kaj laboras kiel forĝisto en
fervoja laborejo. Krom
Esperanto li ŝatas ligno-
skulptaĵojn kaj kolektas
kaktajn. Kiu ŝatas kore-
spondi volas skribi al:
S-ro Viggo Skon Nielsen,
17 Kiwi Street, St. Leonards,
Dunedin/Nov Zelando.

**AFEE-jarkunveno okazos
8. - 9. 4. 1972 en Krems.**

Achtung! Fahren Sie mit in die Ardennen!

Dreiländer-Jahresversammlung in dem
Städtchen Clervaux (Clertf)

im nördlichen Luxemburg
6. bis 9. Oktober 1972
gemeinsam veranstaltet vom belgischen,
deutschen und französischen
Landesverband

Vorläufiges Programm:

6. 10. Pressebesprechung
Eröffnung einer Ausstellung
Vorstandssitzungen
7. 10. Vormittag Arbeitssitzungen und
Ausflug
Nachmittag Vollversammlung
Abend Kultur- und Festabend mit
Orchester, Chor, Solisten, Tanz-
gruppe und Tanz für alle
8. 10. Ökumenischer Gottesdienst
Kranzniederlegung am örtlichen
Ehrenmal
Empfang seitens der Stadt
Ganztägiger Ausflug
9. 10. Gemeinsame Fahrt nach der Stadt
Luxemburg und deren Besichtigung.
Dort Mittag Schluß.

Wir empfehlen, schon jetzt die Tage für diesen Mini-Kongreß zu reservieren, der in einer herrlichen Landschaft stattfindet und dessen Ziel es ist, den kürzlich gegründeten Luxemburgischen Esperanto-Bund zu unterstützen sowie den Boden vorzubereiten für die spätere Gründung eines neuen IFEF-Landesverbandes.

Fakaj anoncoj

Vagonoj sen bufroj
Preskaŭ 30 fakuloj kunvenis
en Plzen el diversaj servoj
de la fervojo kaj el loko-
motivfabriko SKODA je la
prelego „La aŭtomata kup-
lilo ĉe CSD“. CSD komen-
cos la rekonstruadon de la
lokomotivoj kaj vagonoj
kun la aŭtomata kuplilo
jam praktike en 1972. Pro
unuaj ekzamenoj ankoraŭ
nunjare provizos du elek-
traj lokomotivoj per aŭto-
mata kuplilo kaj kune kun

2-3 vagonoj sukcesos en
1972 je la linio Plzen-
České Budejovice. En 1979,
en paso de 20 tagoj, en la
tuta reto CDS faros ŝanĝon
de la malaŭtomataj kupli-
loj. La bufroj restos portem-
pe, ĝis 1984.

(Libere kaj mallonge tradukis el Západočeský zeleznicár c. 41/71 „Vermo“. el: raitis rautatieläinen.)

**Redaktiino por n-ro 2 estas
la 10 an de junio 1972.**

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner- Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanto Fervojista Asocio.